


la Riverego

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Aŭtuno de 1990. Nro 20^a. Jarkolekto 5^a.

0,75 \$



1990 INTERNACIA ALFABETIGA JARO (1)

Renkontiĝoj

La somerfina semajnfina renkontiĝo de la Ontario Esperanto-Asocio okazis en Porso (Perth) dum la semajnfino de la 8^a kaj 9^a de septembro. Kvankam ĉeestis nur kvin homoj, ĝi laŭdire estis tre ĝuinda. La aŭtuna semajnfina renkontiĝo de O.E.A. okazos de la 23^a ĝis la 25^a de novembro. Informoj ĉe O.E.A., C.P. 80, succ. B, Ottawa (Ontario) CANADA K1P 6C3.

Cetere, estas interese scii, ke, dum ĝia dua kongreso (1990.05.18-21), kiu antaŭe okazis en Kicenero sed fine okazis en Otavo, la ĉeestantaro decidis pri nova strukturo, kun Komitato renkontiĝanta kvarfoje jare, sub kiu troviĝas pli granda estraro.

La Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo (pli malpli vintra E.I.K.) okazos en Findentrop (Sauerland, Germanio [eks-F.R.G.]) de la 28^a de decembro 1990 ĝis la 3^a de januaro 1991.

La venonta renkontiĝo de la Esperanto-Societo Kebekia okazos en Sainte-Catherine-de-Halley (antaŭe nomiĝis Kateville) (Estrio), la 8^{an} kaj 9^{an} de junio de 1991.

La Internacia Junulara Kongreso okazos en Karlskoga (suda Svedio), de la 20^a ĝis la 26^a de aŭgusto.

La Universala Kongreso de Esperanto okazos en 1991 en Bergen (okcidenta Norvegio), de la 27^a de julio ĝis la 3^a de aŭgusto.

La Riverego

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto : 225.
ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktis: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Normand Fleury, Claude Lebus, Patrice Mongeau, Régis Ostigny, Cyrille Robidoux kaj Yanic Viau.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo.

UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,75 \$, plus sendokostoj.

Limdato por la venonta numero : 1-a de decembro de 1990.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
MONTREAL, QUÉBEC
KANADO H2G 3C8 telefonorespondilo: (514) 272-0151

Kunlabori por la sama celo

Mark Fettes

L'auteur établit un parallèle entre l'alphabétisation et l'espéranto: les deux visent à ouvrir l'esprit au monde, et font partie d'un même processus d'évolution culturelle. Il s'interroge ensuite sur le niveau d'alphabétisation des espérantistes: tous savent lire, mais à quel point? L'apprentissage doit être continu.

Movado por internacia alfabetigo

Same kiel alfabetigo en nacia lingvo libergas la menson de ĝia nur loka perspektivo, tiel alfabetigo en la internacia lingvo malfermas pordon al vere tutmonda pensado. La similecoj estas frapaj. UNESKO lokas la alfabetigon centre en sia strebado doni *kulturan dimension al la evoluo*, laŭ ĝia ĝenerala direktoro Frederico Mayor. *Ni parolas pri fundamenta homa rajto, kaj UNESKO povas nur emfazi kiel eble plej plenan disvolvon de la potencialoj kaj kapabloj de ĉiu individuo*. Sed stimuli tiun disvolvon estas malfacile. *Oni ne igas la homojn legipovaj: ili legipovigas sin, kiam ekzistas taŭga motivo kaj instigo. Tial alfabetigaj agadoj nepre bezonas la apogon de post-alfabetigaj programoj... Iuj grupoj en la socio bezonas specialan helpon kaj atenton... Kaj ĉio ĉi devas servi al la vera progreso kaj sendependiĝo de la individuo kaj la socio, donante al ili novajn kapablojn.*

Tiuj frazoj kvazaŭ resumas la celojn kaj problemojn de la Esperanto-movado. Ni laboras por malfermi al la homoj rektan aliron al internaciaj kontaktoj kaj informoj. La komunikado por ni staras centre en la evoluo de ĉiu homo kaj ĉiu socio, centre en ĉiu kulturo. La rajton je komunikado ni celas igi pli vasta ol ĝi iam estis. Sed kiel legipovuloj en

nelegipova socio, ni frontas malfacilaĵojn transdoni tiun kapablon. Tro malofte ekzistas *taŭga motivo kaj instigo*. Niaj post-alfabetigaj programoj lamas. Kaj multaj *novaj kapabloj*, kiujn principe povus peri Esperanto, pro tio restas nurlatentaj.

Tamen la evoluo de la alfabetigo povas kuraĝigi nin. Kiel Esperanto, ĝi estas homa inventaĵo. Dum jarmiloj ĝi restis limigita al malgranda tavolo de la socio. Sed la presmaŝino kaj la disvastiĝo de baza edukado survojas fari la legipovon universala. Ĝia potenco atendis nur taŭgan momenton por plena disvolviĝo.

Alfabetigo en la Esperanta komunumo

Nia lingvokomunumo estas unika, ĉar ĝi ne konas la nelegipovon. Tion almenaŭ oni foje diras. Sed ĉu legipovo estas io tiel absoluta? Estas vasta gamo de kapabloj inter la pena deĉifrado de baza legolibro kaj la ĝuado de la poezio de Auld aŭ la prozo de Schwarz. Tiurilate ni ne tiom bone fartas. Kiom da esperantistoj kapablas legi aŭ skribi samnivele, kiel en sia denaska lingvo? Manpleno, por diri honeste. Ne temas pri tio, ke la lingvo tro malfacilas aŭ la homoj tro stultas, sed simple ke mankas la motivoj kaj la edukaj rimedoj, kiuj karakterizas lanaciajn lingvojn.

Ne baldaŭ venos solvo al tio. Sed ni almenaŭ konsciu pri la

amplekseco de la problemo, kaj laboru laŭeble por forigi ĝin. Esperantisto, kiu ĉesas lerni, kiu ĉesas plibonigi sian regon kaj ĝuon de la lingvo, ekmalpartoprenas en la alfabetiga strebo, kiu estas la esenco de nia movado. Tial tiom gravas la

kursoj, la libroj, la revuoj. Ili estas la iloj de dua alfabetiga revolucio, kiuj ebligas al ĉiu partoprenanto kaj leganto vastigi sian konscion kaj kapablojn. Kaj kun UNESKO ni povas nomi tion nia vera celo.

[*Esperanto*, januaro de 1990]

De par le monde

Cyrille Robidoux

L'espéranto, en vert et pour tous

Le groupe parlementaire européen des Verts a été le seul, lors des dernières élections européennes, à proposer son programme en espéranto. Le secrétaire de ce groupe, Leo Cox, a annoncé que les informations, documents, études et rapports en espéranto sur les problèmes et événements liés à l'écologie sont bienvenus. Toute contribution doit être rédigée de manière soignée, claire et bien documentée. Adresse: Eŭropaj Verduloj, Eŭropa parlamento, Belliard-str. 97-113, B-1040 Bruxelles, Belgique

L'espéranto pour la médecine naturelle

Fondée à Shenyang en octobre dernier au sein de la Ligue Internationale de médecine chinoise de Hong Kong, le Groupe international espérantiste de médecine naturelle se donne pour but de coopérer plus activement à la diffusion de la médecine naturelle (sans usage de médicaments). Le

responsable du groupe est Wang Huai Yu, 9-hao, 17-Li, 2-duan, Guilin-jie, Heping, 110002 Shenyang, Chine.

SAT-Amikaro, juin 1990

Des débouchés pour l'espéranto

La Chine recherche actuellement des spécialistes étrangers de diverses professions intellectuelles (professeurs, ingénieurs, etc.) parlant l'espéranto pour y travailler durant une certaine période afin d'aider des usines, firmes, entreprises et instituts à résoudre des problèmes techniques. Les frais de voyage seront assurés, ainsi qu'un salaire à convenir. Toute demande doit être adressée, avec C.V. en espéranto, à: S^{ro} Wang Xigen, Shitai-xian, Ren-shi-jun, Anhui, CN-245100 Chine

SAT-Amikaro, mars-avril 1990

Encore un centre d'espéranto

Des cours d'espéranto ont lieu sans interruption à Bydgoszcz dans une maison de l'espéranto récemment construite et bien équipée (salle de lecture, salle de télévision avec

antenne pour réception de programmes étrangers transmis par satellites). Le programme attrayant d'études prévoit aussi des excursions (52 stages d'une semaine par an). Inf.: Esperantotur, M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pologne.

SAT-Amikaro, mars-avril 1990

L'espéranto en Mongolie

À Ulan-Bator, la capitale de la Mongolie, il y a plus de 60 espérantistes. Même s'ils n'ont pas beaucoup de contacts entre eux, ils ont fondé une Société espérantiste où se rencontrent une fois par mois les 60 membres. Ils travaillent présentement à la compilation d'un dictionnaire mongol-espéranto.

TEJO-Tutmonde, mai-juin 1990

Langue pacifique

Jusqu'à maintenant, j'ai cru que l'espéranto avait été créé pour éliminer la haine et l'animosité entre les peuples, mais je me suis sans doute trompé. Dans un article sur les relations France/Canada (Monato 1990/3 p.17), Victor Epp parle des Français d'une manière inacceptable dans une revue espérantiste. Ces remarques désobligeantes et grossières ont peut-être leur place dans une revue en langue nationale, mais pas dans une revue espérantiste qui a un auditoire international réparti partout dans le monde. Les lecteurs français ont le droit de se sentir insultés par ces calomnies.

Lettre à Monato de Jean Martignon,
France, juillet 1990

(Il semble que l'étroitesse d'esprit et l'attitude francophobe de Monsieur Epp aient traversé nos frontières et se soient internationalisées. Bravo Monsieur Epp! C.R.)

Reago

Fanatikeco

de Patriko Monja

En la somera *la Riverego*, Marteno skribis: *On prend contact avec l'espérantophonie non via des fanatiques mais plutôt par hasard. [...] Le contact de personne à personne trouve aussi sa place, à la condition qu'il soit teinté d'objectivité et qu'il repose sur des faits.*

Se la celo de tiu diro estas

malbonvenigi la fanatikulojn kaj sciigi al ili, ke ili ĝenas, mi ricevos la mesaĝon. Mi ja sentas kaj scias, ke mi estas fanatikulo. Mi ĉesos esperantisti. Mi ne volas ĝeni.

Mia opinio estas, ke multaj, eble eĉ ĉiuj esperantistoj estas fanatikaj. Elekti Esperanton estas jam iom fanatike. Kiel oni scias, kiam *contact de personne à personne* estas de fanatikulo aŭ ne?

Se oni rifuzas fanatikulojn, restos en la movado ĉefe la neagemuloj. Havu ili kune agrablan trankvilan movadon. Mi bezonas pli emociplenan etoson. Mi ŝatas interŝanĝi kun homoj konvinkitaj pri tio, kion

ili esperas cele al plihomecigo de la estonteco.

Cetere, mi daŭre simpatias kun la laŭ mi tre fanatika aŭtoro de la de mi citita artikolo.

Internacia Junulara Kongreso en Montrealo ?

Pourquoi pas un congrès international de jeunes à Montréal, en 1992? Telle était la proposition de Normand Fleury à une quinzaine d'espérantiste, le 7 septembre. Tous ont été enthousiasmés par l'idée et sont prêts à collaborer. La décision sera bientôt prise par la direction de l'Organisation mondiale des jeunes espérantistes. Mais, pensez-y: un congrès mondial au Québec, avec de 100 à 300 participants.

Vi povas legi en dua paĝo de ĉi-Riverego, ke la venontjara I.J.K. okazos en Svedio. Sed kion pri tiu de 1992? Tiu jaro estos la 500-jara datreveno de la malkovro de Ameriko kaj la 350-jara datreveno de la fondo de Montrealo. Do, kial ne inviti la I.J.K.-on en Montrealo?

Tiun demandon faris Normand Fleury al grupo de pli ol dek kvin esperantistoj, vendredon 7^{an} de septembro. Inter ili estis la ĝenerala sekretario de TEJO, otavano Yves Bellefeuille. Ĉiuj trovis la ideon interesa, entuziasmiga; nur du timis, ke ni ne havos sufiĉan forton pro akcepti inter 100 kaj 300 gejunulojn dum tuta semajno, kvankam E.S.K. jam organizis, antaŭ la U.K. en Vankuvero, en 1984, antaŭkongreson kiun partoprenis pli ol cent

homoj, dum plena semajno.

Ni do konsistigis provizoran L.K.K.-on (Lokan Kongresan Komitaton) el ses membroj:

Normand Fleury, prezidanto;

Zdravka Metz, kasisto;

Yves Bellefeuille, sekretario;

Patrice Germain, programo;

Sylvain Auclair, eksteraj rilatoj;

kaj Régis Ostigny, kongresejo.

Ilia nuna tasko estas pretigi invitosieron, kiun ni sendos al la estraro de TEJO. Laŭdire, ankaŭ slovakaj junaj esperantistoj emas inviti la I.J.K.-on: la U.K. tiujare okazos en Prago.

Se TEJO akceptos nian inviton, ni certe havos multan laboron. Ĉiuj ĉeestantoj diris sin pretaj kunhelpi. Ni esperas pliajn. Sed nur pripensu: internacia kongreso en Kebekio...

Ĉu anglalingvaj informiloj?

(daŭrigo kaj fino)

Réactions au texte et à la proposition de Victor Epp sur les dépliantes en anglais pour la S.Q.E. Le texte a soulevé de nombreux commentaires négatifs.

La dupaĝa letero de Victor Epp, en la somera *la Riverego*, vekis multajn reagojn. Estraranoj — dum estrarkunsido — kaj neestraranoj plendis al la redaktanto, ke li ellasis tian artikolon en la bulteno. Oni taksis ĝin troaĉa, mensoga, kalumnia, malesperanteca, lingvo-politika, k.s. Oni eĉ timis, kian bildon havos pri Kebekio alilandanoj, kiuj legas tiun tekston kaj ne povas scii pri la vera

situacio. S^{ro} Epp, vi malhelpis vian proponon...

La redaktanto — kiu cetere tute ne subtenas la Epp-ajn ideojn pri la lingva situacio en Kebekio — emas flegi ide-interŝanĝon kaj malŝatas cenzuradon. Sed iuj tekstoj foje vekas fortajn reagojn, kaj necesas resti singarda.

Vi povos legi ĉi-sube diversajn reagojn al tiu afero.

Reago

Bonvenon al anglalingvanoj

de Patriko Monja

Mi estas tre kontenta, pro tio, ke mi laboras per la franca lingvo. Mi sentas, ke la plimulto estas franca en Kebekio, kaj mi fieras esti el malplimulto en Ameriko.

Tamen, estas nombraj la anglalingvanoj ĉi tie, kaj kiel esperantisto kaj same kiel Victor Epp, mi volas per ĉiuj rimedoj krei movadon egale alireblan el ĉiu alia lingvo kaj kulturo.

Mi povus kompreni, ke la estraro de E.S.K. ne volas mem labori por propagandi en la angla. Sed mi vidas la rifuzon de la helpo de Victor Epp por tion fari kiel diskriminacion lingvan. Mi ne vidas la ĝenon

kaŭzutan de tiu helpo. Mi nur komprenas, ke la nuna estraro malbonvenigas la anglan kaj ĝiajn uzantojn. Tiu estraro estru asocion de franclingvanoj, kiuj ne deziras kontaktojn kun la aliaj etnoj.

Pri la respondo de la ESK-estraro, ke propagandi anglalingve estas tasko de K.E.A., mi konsentas, ke K.E.A. propagandos por Esperanto kaj por K.E.A. Jen estas bone, sed indas propagandi ankaŭ por ESK. Se neniu volus labori angle por ESK, estus interese interkonsenti kun K.E.A., por ke K.E.A. respondu al anglalingvaj informpetoj senditaj al ESK. Sed

kiam iu pretas helpi, kial bremsi? Ĉu vi ne aliflanke petas helpon? Ĉu vi ŝatas nur helpon de sencelaj membroj, kiuj plenumos viajn bezonojn sen grumbli? Laŭ mi, kiam

iu volas ion bonan fari, tiu tion faru. Bonvenon al anglalingvanoj. Bonvenon al la helpo de ili al ili. Aŭ vi malpermesos al ili paroli inter si!

Reago

Vi mirigis min, S^{ro} Epp

Régis Ostigny

Mi neniam kredus iam legi kontraŭ-franclingvanan artikolon en la *Riverego*. Dankon, S^{ro} Epp, vi mirigis min. Mi ne sciis, ke Kanado protektis la francan lingvon. Fakte, mi certigas vin, ke mi neniam vidis la efikon de tia leĝo. Sed mi nun elvojiĝas, same kiel vi elvojiĝis en via artikolo. Mi kredis, ke vi parolos

pri via malkonsento kun decido de la estraro de E.S.K. Anstataŭe, vi metis argumentojn pri la graveco de la angla lingvo. S^{ro} Epp, mi ŝatus prezenti al vi mian manon, kiel Esperantisto, por ke vi forgesu, ke mi estas franclingvano. Eble mi pardonos al vi la ofendon.

Responde al Victor Epp

Normand Fleury, prezidanto de E.S.K.

S^{ro} Epp, mi volas reagi al via artikolo en la lasta *Riverego* en la nomo de la estraro de E.S.K.

Se vi povas teoriumi pri la franclingvanoj, mi verŝajne rajtas same fari pri la anglalingvanoj en Kebekio. Laŭ mi, estas du kategorioj de anglalingvanoj en Montrealo. La denaskaj angleparolantoj, kiuj decidis resti en Kebekio, ĉar ili ŝatas vivi ĉi tie pro la etoso, kaj tiel plu. Ili kutime paroletas, eĉ ofte bone parolas la francan. Do, proponi al ili esperanton kiel kebekian intergentan lingvon estus kiel malpravigi la tempon kaj la studlaboron, kiujn ili

dediĉis al la lernado de la franca. La dua kategorio estas la enmigrintoj. Plej ofte ili alvenis kun baza kono de la angla, tuj eklaboris por vivteni sin kaj plue lernis la anglan ĉar ĝi estas pli facila... kaj ĉar ili vivas en Nordameriko... eble ili transloĝiĝos al Toronto... aŭ en Usonon, se ili povus. La franca multe ĝenas ilin ĉar pro ĝi ili ne sukcesas akiri la laborlokon kian ili volus havi.

Diri ke ni ne varbas ĉe anglalingvanoj estas tute malvere kaj pruvas vian nekonon de la kebekia esperantista movado. Dum la lastaj jaroj, Paul Ronald verkis multajn

artikolojn en la angla pri esperanto. Tamen, daŭre estas nur kvin membroj en la montrealokcidenta klubo. Mi mem kelkfoje intervjuigis ĉe anglaj radiostacioj kaj ĉefe, estis televida elsendo pri esperanto. Lasu min rakonti. En 1987, ni faris 10-minutan francan televidintervjuon pri esperanto kaj ĝia movado. Ni ricevis centon da reagoj (letere, telefone). La tuto estis tre sukcesa malgraŭ la fakto, ke la dissendo okazis je la 14h15. En marto 1990, jes ĉi-jare, ni faris tute similan 10-minutan intervjuon ĉe CFCF-Park Avenue Metro, kaj la dissendo okazis inter la 19h30 kaj la 20h, do en tre trafa horo por televidumantoj. Ni ricevis du reagojn!

Konkrete, ni ricevas eble 10 informpetojn jare en la angla. Se vi pretas traduki, tajpi kaj prespretigi la varbilon de E.S.K., ni volonte faros kelkajn fotkopiojn. Sed ne postulu poste ke la tuta societa laboro kaj eĉ *la Riverego* fariĝu trilingvaj! Tio okazos verŝajne nur kiam duono de nia membraro estos anglalingva kaj kiam ili partoprenos aktive la movadon.

Ĉu vi pretas varbi en angla medio? Ĉu vi pretas starigi informbudon pri esperanto en McGill Universitato aŭ aliloke? Ĉu vi pretas intervjuigi kun anglaj ĵurnalistoj?

La esperanto-movado en Belgio funkcias pere de flandra kaj de

francalingva asocioj. En Hispanio, estas la hispana kaj la kataluna movadoj. Ĉu pro tio vi taksas ilin diskriminaciaj?

Krome notu: ĉe la telefonlibro staras *Esperanto Information*. Ni intence elektis tiujn vortojn, tiel ke ĉiuj povos trovi nin. Krome la respondilo respondas trilingve... kaj la tria lingvo ne estas la ĉina!

Reage al Patriko

Mi ne volas senkulpigi la estraranojn sed nia reago malfavore al la eldonado de anglalingva flugfolio de E.S.K. fontas el du ĉefaj kialoj.

Unue, eldono de flugfolio postulas tempon: ne nur necesas traduki ĝin! La estraranoj estas jam tre okupitaj, do neniue emis okupiĝi pri tio.

Due, ni antaŭvidis, ke poste S^{ro} Epp petos pli ampleksan trilingvigon de E.S.K., kiel trilingvecon en *la Riverego*. El niaj 160 membroj malpli ol dek parolas la anglan! Eĉ K.E.A. ne trovas inde uzi la anglan en *Lumo*, eĉ se pli ol 75 elcentoj de ĝiaj membroj estas angleparolantoj. Kial ni faru tion por 5 elcentoj de nia membraro?

Fina noto

En ĉi numero de *la Riverego* ni fermas la debaton. *La Riverego* celas informadon pri la movado kaj ne atakon de iu grupo al alia. Punkto fina.

KEJO

Sur la rencontre de jeunes

Janiko Vijo

C'est à Laval, les 24, 25 et 26 aout [nouvelle orthographe] derniers, que s'est déroulée la première rencontre québécoise de jeunes sur l'espé-

ranto, sous le thème de l'initiation.

Les treize participants s'étaient donnés rendez-vous chez Régis Ostigny, l'un des quatre organisa-

teurs de cette fin de semaine. Des cours pour débutants de différents niveaux ont été donnés à ces jeunes de la grande région de Montréal, à qui on a aussi fait connaître le mouvement et ses activités.

D'autres activités ont de plus été au programme telles que la baignade, la musique et des visites d'espérantistes.

On peut vraiment considérer cette rencontre comme un succès car tous

les participants se sont dit prêts à continuer leurs cours ou à participer aux activités du mouvement. On pense déjà à la façon de répéter l'expérience l'an prochain.

En terminant, le comité organisateur remercie chaleureusement Tamara Koziej et Régis Ostigny pour nous avoir fourni le lieu de la rencontre et tout leur bon travail qui a contribué à la réussite de cette fin de semaine.

KEJO

Une nouvelle branche jeunesse

Janiko Vijo

Le 27 août dernier, suite à la rencontre de jeunes de Laval, le C.A. a officialisé l'existence de la branche jeunesse de la S.Q.E., soit "Organisation de la Jeunesse espérantiste du Québec (OJEQ). Son comité exécutif est formé de quelques jeunes, dont Régis Ostigny qui en est le délégué au C.A. Parmi les projets envisagés, on retrouve

une tournée des écoles avec kiosques d'information et cours. Aussi, une possible formation d'une délégation québécoise est envisagée pour le congrès international de la jeunesse qui aura lieu en Suède l'an prochain. D'autres informations paraîtront dans les prochains numéros de *la Riverego*.

KEJO

Aux étudiant-e-s de cégep

Par expérience, nous savons, à la S.Q.E., que les cégeps — bien plus que les universités, par exemple — sont des milieux propices pour faire connaître l'espéranto. Mais il nous faut un contact à l'intérieur de l'établissement. Voulez-vous faire connaître l'espéranto dans votre cégep? Le travail à faire: poser des affiches, peut-être tenir un kiosque, ou organiser une séance

d'information. Et si ça marche, on pourrait même penser à organiser un cours (faut trouver un local, et tout et tout...). La Société est prête à fournir de l'aide. Pour des raisons pratiques, le tout serait plus facile à organiser dans la région montréalaise, mais tout reste possible.

Contactez notre fidèle répondeur: (514) 272-0151.

Societaj informoj

KEJO

Dum la lasta aŭgusta semajnfino okazis en Sainte-Rose renkontiĝo de junuloj interesitaj de Esperanto. Ĝin partoprenis dek unu junuloj, plus kelkajvizitantoj.

Dume, la ĉeestantoj decidis fondi KEJOn, la Kebekian Esperantistan Junularan Organizon. Ĝi fakte ne estas aparta organizo, kun aparta kotizo aŭ membreco, sed pli iu komitato de E.S.K., kies celo estas junularaj varbado kaj aktivecoj. Nun estras KEJOn Patrice Germain kaj Yanic Viau.

Oficeja teamo

Ne temas, ke oni trinkas teon en la oficejo de E.S.K., sed ke kreiĝas iu laborteamo por plenumi tiun gravan sed iom tedan laboron, ĉefe korespondan. Eklaboris Patrice Germain kaj Yanic Viau kun Sylvain Auclair. Ni ankaŭ memoru, ke la Libroservon prizorgas Normand Fleury. Ĉia helpo estas tamen ankoraŭ bonvena.

Statutsanĝo

Finfine sen referendumo la estraro decidis modifi la statuton en du manieroj: unue, E.S.K. ne plu estos asocia membro de la Kanada Esperanto-Asocio; ni memoru, ke ŝanĝo en la kotizsistemo de K.E.A. neniigis la avantaĝojn de la membreco. Sekve, ne plu troviĝos aliĝilo al K.E.A. en la Riverego.

Due, membreco daŭros tutan jaron ekde la membriĝo, sen rilato plu kun la kalendara jaro. Nova statuto haveblas ĉe la Societo.

Celo: junuloj

Laŭ ideo de Régis Ostigny, ni eldonos apartan flugfoliojn por la junularo, kaj klopodos ĝin trafi en lernejoj. La flugfolio substrekos la okazigon de la kongresoj en Skandinavio, dum la somero de 1991. Tiel la varbitoj havos celon en la lernado: vojaĝi.

Gazetoj

Almenaŭ (nur) du gazetoj parolis pri Esperanto dum la lastaj monatoj: *le Zele*, studenta gazeto de cégep Montmorency, kaj *le Journal de Montréal*, okaze de la U.K. Cetero, ni invitas ĉiujn membrojn sciigi la estraron, se oni trovas artikolon pri Esperanto. Kaj ankaŭ verki en fakgazetoj.

Perpoŝta kurso

Sub la gvido de Sylvain Quirion daŭras la perpoŝta kurso. Li represigis la unuajn du lecionojn, kiujelĉerpiĝintis.

Membroj

Nun membras en E.S.K. 157 homoj, el kiuj 80 estas esperantistaj membroj kaj 77 estas Amikoj de Esperanto.

À propos de la S.Q.E.

KEJO

C'est dans la dernière fin de semaine d'août que s'est tenue à Sainte-Rose une rencontre réunissant onze jeunes intéressés à l'espéranto. En plus de quelques visiteurs. Onze participants, c'est assez remarquable.

Ils ont d'ailleurs décidé de fonder KEJO, l'organisation des jeunes espérantistes québécois. Il ne s'agit pas d'une association autonome, mais plutôt d'un comité jeunesse de la S.Q.E., chargé de la publicité et d'activités pour les jeunes. KEJO est actuellement dirigé par Patrice Germain et Yanic Viau.

Une équipe pour le bureau

C'est le bureau de la S.Q.E. qui a la tâche, entre autres, de répondre à toute la correspondance: travail important mais fastidieux. Une petite équipe s'est récemment mise sur pied, Patrice Germain et Yanic Viau travaillant désormais avec Sylvain Auclair. Rappelons que le service de livres est entièrement tenu par Normand Fleury. Toute proposition d'aide est encore la bienvenue.

Amendement aux statuts

C'est finalement sans référendum que le Conseil a doublement modifié les statuts: d'abord pour que la S.Q.E. ne soit plus membre associé de l'Association canadienne d'espéranto — il n'y aura donc plus de formulaire d'adhésion à l'A.C.E. dans *la Riverego*; ensuite pour que le membership ne soit plus astreint au calendrier, mais dure un an à partir de l'adhésion. Les nouveaux statuts sont disponibles auprès de la S.Q.E.

Objectif: jeunes

Il faut atteindre les jeunes, selon Régis Ostigny. C'est pourquoi la S.Q.E. éditera bientôt un dépliant visant spécifiquement cette clientèle. Il soulignera la possibilité de participer aux deux grands congrès, en Scandinavie, à l'été 1991, donnant ainsi un but à l'apprentissage de la langue.

Membres

La S.Q.E. compte actuellement 157 membres, dont 80 Ami-e-s de l'espéranto.

La movado en Montrealo

Le Club d'espéranto de Montréal a un problème d'organisation. Personne n'en a la responsabilité, ce qui fait qu'il ne s'y passe presque plus rien.

En Montrealo troviĝas la plej granda grupo de Esperantistoj en Kebekio. Sed tio ne certigas bonan kunagadon. Ni diru ĝin klare: la Montreala Esperanto-Klubo ekzistas preskaŭ nur surpapere.

Esperantistoj, ĉefe komencantoj, devas havi okazon renkontiĝi kunparoli kaj praktiki la lingvon, se tio eblas. Klubo estas plej ofte taŭga ilo por tio. Sed iu devas respondi pri la organizado de la renkontiĝoj (kaj pri aliaj aferoj, kiel kotizoj, k.t.p.). Kvankam estas en Montrealo multaj agemaj Esperantistoj, ili plej multe emas okupiĝi pri aliaj, laŭ ili pli gravaj, urĝaj aŭ interesaj, aferoj. Kvankam estas libera loko por la

renkontiĝoj, ĝi utilas ĉefe por oficejaj — tamen gravaj — laboroj. Kvankam iuj Montrealanoj deziras lerni Esperanton, neniuj havas la emon aŭ tempon instrui al ili. Kvankam Esperantistoj volas renkontiĝi, neniuj havas la emon respondi pri tiuj renkontiĝoj.

Ĝis nun estis renkontiĝoj lastan lundon de la monato. Tiu tago same indas kiel aliaj, kaj ĝi ektradiĉiĝis. Sed oni devas ĉiam rememorigi al la homoj (*la Papago*, kvankam interesa ilo, ne atingas ĉiujn, ĉar iuj ne telefonas ĝin). Iu devas ĉeesti la renkontiĝon. Iu devas zorgi pri programo. Iu...

Klaĉoj

Suzanne Bolduc, Patrice Mongeau kaj Maryse forlasis la Esperanto-Domon por krei novan. Ili aĉetis propran domon, en kvartalo Villeray. Samtempe, Sylvain Bélisle, Denise Richard kaj Gabrielle decidis reveni el la Chaux-de-Fonds. Eksciinte, ke Patriko serĉas luantojn, ili ekloĝis en la sama domo, ĉe la etaĝo.

Danielle Bédard kaj Yvon Roux ĉi-somere foriris Eŭropon por longa esperantista vojaĝo. Bonan restadon!

Régis Ostigny finfine kunloĝas kun la edzino, polino Tamara Koziej. Li vojaĝis Eŭropon dum kelkaj semajnoj, kaj iel *premis* la kanadajn enmigrajn instancojn.

Krokodiloj svarmis okaze de la Kuba kongreso. Ne temis pri parolantaĉoj, sed pri veraj krokodiloj, vidataj dum ekskurso al krokodil-bredejo.

Ĉu vi pentas?

Borje Lund (Rokgrupo *Persone*)

Ĉu vi pentas nun ke vi militservis
Dum la rekrutad' vi ja vere vervis
Tiam pensis vi «mi fariĝos viro»
Rampis kun fier' tra la kot' kaj ŝmiro
Ho! kia malbonŝanc' startas nun milito
Ĉu surpriziĝas vi? Ha! kia hipokrito!
Nun pafas vi al land' kie vi jam estis
Jes, vi vizitis ĝin, kaj vi tie festis
en la I.J.K.

Ĉu vi pentas nun ke vi militservis
Dum la bombatak' vi ja vere nervis
Nun malamikarme' venas kun impeto
Saltu el la fosaj' levu bajoneton
Fimalamiksoldat' frapas vin altere
Lian indulgon nun petas vi sincere
Kaj li retenas sin kvankam li pikontis
Kaj vi rekonas lin, vi lin jam renkontis
en la I.J.K.

Internacia koresponda lingvokurso

Se vi havas malmulte da tempo, se vi ne povas viziti lingvokurson, se vi mem volas difini vian rapidecon en la lernado, partoprenu la internacian korespondan lingvokurson por progresantoj.

La partoprenkotizo diferencas laŭ la jara nacia enspezo. Ekzemple por nederlandanoj ĝi kostas 100 \$, por hungaroj 25 \$, por pakistanoj 8 \$ por zambianoj 6,50 \$, por brazilanoj 24 \$ aŭ egalvalorojn.

Se iuj neniel povas transpigi aŭ pagi tamen forte ŝatus perfektigi sian lingvoscion, skribu al ni, kaj ni klopodos trovi solvon por ili.

La kotizo estas pagenda post la ricevo de la unua taskfolio al la konto ĉe U.E.A. *Internacia Koresponda Lingvokurso*.

Pliaj informoj ĉe:

Hungara Esperanto-Asocio
H-1369 Budapeŝto
Pf. 193
Hungario

Kristnaska donaco — Un cadeau de Noël

Kial ne oferti al amiko abonon al *la Riverego* kiel kristnaskan donacon? Vi almenaŭ helpos al al disvastigo de Esperanto. Uzu la ĉisuban aligilon. Vi povos ricevi impostankvitancon

Pourquoi ne pas offrir un abonnement à *la Riverego* à l'occasion de Noël? Vous contribuerez au moins à faire connaître l'espéranto. Utiliser le coupon et recevez même un reçu pour fins d'impôt.

Mi deziras oferti abonon al *la Riverego* al la jenaj homoj. Mi enmetas kvin dolarojn por ĉiu abono.

Je désire offrir un abonnement à *la Riverego* aux personnes suivantes. Ci-joint cinq dollars par abonnement.

Por kristnaska donaco, sendu ĝis la 15^a de novembro.

Pour en faire un cadeau de Noël, envoyer avant le 15 novembre.

Fotkopiu laŭbezzone — Photocopier au besoin.

Nomo: _____

Adreso: _____

Poŝta kodo: _____ Telefono: () _____ - _____

Nomo: _____

Adreso: _____

Poŝta kodo: _____ Telefono: () _____ - _____

Numero de abonoj: _____ x 5\$ + libervola donaco al E.S.K. _____ \$ = _____ \$

Mi deziras impostan kvitancon — Je désire un reçu pou fins d'impôt: _____

Nomo de la donacinto — Nom du donateur: _____

la Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Aŭtuno de 1990. Nro 20a.

Ĉi-numere :

Ĉu vi pentas?

Fondation de l'OJEQ

Ĉu I.J.K. en Montrealo?

Reagoj al la letero de Victor Epp
Internacia koresponda lingvokurso

Société québécoise d'espéranto
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal H2G 3C8